Superrigardo pri KODEJO
Jaro 2011

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Petra Smidéliusz
estrarano pri landa agado
Baze de la raporto de 2010 fare de Alex Baudry

12/06/2012

Enhavo

1. Enkonduko 2
2. Partoprenintaj landaj sekcioj 2
3. Membraro 5
4. Pritakso de la agado 6
5. Estraro 12
6. Informiloj 14
7. Renkontiĝoj 15
8. Konkludo 17

1. Enkonduko

La ĉefa celo de KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj) estas ekkoni la aktualan staton de la landaj sekcioj de TEJO, havi pli da informoj pri iliaj situacio, agadoj, sukcesoj kaj problemoj. Ĉi-jare, rilate al la jaro 2011, la demandaron respondis bedaŭrinde nur 24 asocioj, kio estas signife malpli ol tiu de 2010 (33 asocioj), iom malpli ol tiu de 2009 (25 asocioj) tamen pli ol tiu de 2008 (19 asocioj).

Respondeculoj de la landaj sekcioj estis petitaj respondi la demandaron inter januaro kaj februaro 2012 tra la reta formularo, kiu aŭtomate sendis la informojn en guglan tabelon.

Aldonindas, ke signifa parto de la demandoj estas subjektiva kaj la demandaron kutime respondas unu persono reprezentanta la organizon, do la respondoj povas speguli la opinion nur de tiu persono.

2. Partoprenintaj landaj sekcioj

La jenaj asocioj partoprenis en la enketo ĉi-jare:

- Juna Esperantistaro Argentina (JEA)
- Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)
- Junulara Esperantista Burunda Organizo (JEBUO)
- Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)
- Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
- Hispana Esperantista-Junulara Societo (HEJS)
- Hungara Esperanto-Junularo (HEJ)
- Itala Esperantista Junularo (IEJ)
- Junulara Esperanto-Ligo Israela (JELI)
- Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
- Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ)
- Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA)

- Junulara Sekcio de Kuba Esperanto Asocio (JSK)
- Litovia Esperantista Junulara Ligo (LEJL)
- Meksika Esperanto-Junularo (MEJ)
- Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
- Norvega Junularo Esperantista (NJE)
- Pola Esperanto-Junularo (PEJ)
- Rusia E-Junulara Movado (REJM)
- Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)
- Junularo Esperanta Svislanda (JES)
- Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ)
- Usona Esperantista Junularo (USEJ)
- Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO)

El inter la 24 respondintaj sekcioj estis 15 eŭropaj, 5 amerikaj, 3 aziaj kaj 1 afrika asocio.

Diagramo 1 indikas, ke pli ol duono (14) de la respondintaj asocioj estas junulara sekcio de nejunulara organizo, 8 de ili estas sendependa organizo kun jura personeco kaj nur 2 estas sendependaj organizoj sen jura personeco.

Diagramo 1



En Diagramo 2 videblas la aktiveca stato de la organizoj. Signife pli ol la duono de la respondintaj organizoj, nome 15 de ili konsideras sin *aktivaj*, krome, 2 de ili raportas sin *vekiĝantaj*. Malpli favora estas la situacio de tiuj 5 asocioj, kiuj taksis sin *dormantaj* kaj estis unu landa sekcio, tiu de Rusio, kiu elektis la staton *morta*. Inter la elekteblaj respondoj estis ankoraŭ la stato *mortiĝanta*, sed tiun eblon neniu asocio elektis.

Diagramo 2

En Diagramo 3 videblas kiel la organizoj taksis sian staton en la antaŭaj jaroj. Kreskas la procentaĵo de la organizoj, kiuj konsideras sin aktivaj. Estas kontentige ke laŭ la enketo, dum la lastaj kvar jaroj ĉiam pli ol la duono de la respondintaj landaj sekcioj taksas sin aktivaj. En 2008, 58 % de ili raportis sin aktiva, dum en 2009 nur 52 %. En 2010, 56 % de la respondintoj konsideris sin aktiva, kaj en 2011, 65 % de ili.

Samtempe, estas malkreskanta la procentaĵo de la organizoj, kiuj taksas sin vekiĝantaj. La procentaĵo de ties asocioj en 2008 estis 37 %, en 2009 36 %, dum en 2010 ĝi falis al 13 % kaj en 2011 estis nur 9 %. La procentaĵo de la dormantaj asocioj montras la kontraŭon, nome kreskantan tendencon. Ilia procentaĵo en 2008 estis nur 5 %, en 2009 jam 12 %, kaj en 2010 ĝi atengis jam 28 %-on. En 2011, ĝi malkreskis iom kaj nur 22 % de la asocioj konsideris sin dormantaj. Bedaŭrinde, kaj en 2010 kaj en 2011, estis po unu asocio, kiu taksis sin morta.

Diagramo 3



Diagramo 4 informas nin pri la financa stato de la organizoj. Triono de la respondintaj asocioj (8) ne havas financajn rimedojn, alia triono raportis pri stabila financa situacio. Sesono de la respondintoj (4) konfesis, ke ili havas sufiĉe da mono nur por baza funkciado. Estis po 2 organizoj, kiuj informis aŭ pri seriozaj financaj problemoj aŭ pri la kontentiga riĉeco de sia organizo.

Diagramo 4



3. Membraro

La sekva ero traktas informojn rilate la membrarojn de la asocioj.

Diagramo 5 montras la membronombrojn de la organizoj, kaj aparte la nombrojn de la kotizpagantoj. La plej altnombran membraron havas GEJ (4500), HEJ (228) kaj JSK (200). (Menciindas, ke la altega membronombro de GEJ estas danke al speciala situacio.) Du asocioj raportis ke ili ne havas membrojn (LEJL kaj REJM). Laŭ statistikaj kalkuloj, la meza nombro

(t.e. mediano) de la membro nombro de la asocioj estas 35.

Kiel videblas, la diversaj asocioj havas malsamajn kutimojn kiel aŭ entute pagigi siajn membrojn. Laŭ la raportoj en 5 asocioj la membroj ne pagas kotizojn (HEJ, ĈEJ, ULEJ, JEA kaj JES), en 10 asocioj ĉiuj membroj pagas kotizon (IEJ, BEJO, MEJ, USEJ, NJE, SKEJ, JELI, KEJ, HEJS kaj KEJA), kaj en 7 asocioj ne ĉiu membro pagas kotizon (GEJ, JSK, JEBUO, PEJ, JEJ, VEJO kaj NEJ). La asocioj, kiuj havas la plej multe da pagantaj membroj estas GEJ, JSK kaj IEJ. La averaĝa nombro de pagantaj membroj estas 28.

Ĉiu asocio, kies membroj pagas membrokotizon, pagigas unufoje jare la kotizon.

Diagramo 5



La akiro de novaj membroj estas ĝenerale unu el la plej defiaj taskoj de la junularaj organizoj. Al nia malfermita demando rilate la varbadajn manierojn, la plej komuna respondo estis, ke oni varbas en universitatoj/lernejoj, 7 asocioj menciis tion. Po 2 landaj sekcioj skribis, ke ili reklamas pere de amaskomunikiloj kaj dum siaj aranĝoj. Krome, unufoje estis menciitaj la jenaj varbadaj maniero: personaj kontaktoj, retaj forumoj, Facebook, lernu.net, lingvokurso, reta lingvokurso, konkurso, prelegoj en lingvaj organizoj, partopreno en internacia forumo. Bedaŭrinde 3 de la respondintaj asocioj skribis, ke ili faras nenion por varbi novajn membrojn, kaj kromaj 7 asocioj simple ne respondis al la demando.

4. Pritakso de la agado

En la enketo estis 6 demandoj pri la agado de la asocioj rilate la engaĝigon kaj akiradon de junaj aktivuloj, informadon, varbadon, rilatojn kun nejunularaj Esperanto-organizoj kaj eksterajn rilatojn. La diagramoj montras la respondojn de la 24 partoprenintaj landaj sekcioj rilate la jarojn 2010 kaj 2011. (Kvankam en 2010 en la enketo partoprenis 33 landaj sekcioj, ni nun analizos la respondojn de tiuj 24 el ili, kiuj plenigis la demandaron ankaŭ pri 2011, sekve ni povas pli klare vidi kiel ŝanĝiĝis la situacio en tiuj organizoj.)

Diagramo 6 montras kiel la 24 landaj sekcioj taksis sian agadon rilate la engaĝigon de aktivuloj en 2010 kaj en 2011. Kiel videblas en 2010 plej multaj de ili opiniis ĝin nek bona, nek malbona. Tio iom ŝanĝiĝis: en 2011 estis nur 5 asocioj kiuj elektis tiun respondon. En

2011, 6 asocioj konsideras la enĝaĝigon de novaj aktivuloj bona (pli ol en 2010) kaj aliaj 6 organizoj konsideras ĝin malbona (pli ol en 2010). La sama kvanto de organizoj (4) raportas pri tre bona enĝaĝigo en ambaŭ jaroj, kaj iom kreskiĝinta kvanto de organizoj (3) taksas ĝin malbonega en 2011.

Sume, la enĝaĝigon de la nunaj aktivuloj la asocioj taksas ĝenerale mezbona.

Diagramo 6



Pri la akirado de novaj aktivuloj informas nin Diagramo 7. En tiu kampo ne rimarkebla multe da diferenco inter la respondoj donitaj en 2010 kaj en 2011. Samkiel en 2010, 4 asocioj taksis tiun agadkampon malbonega kaj iom malpli da ili (8 en 2011 kaj 9 en 2010) konsideris ĝin malbona. Ne ŝanĝiĝis la nombro de organizoj kiuj respondis, ke la akirado de novuloj en sia organizo estas nek bona nek malbona, kaj preskaŭ samas ankaŭ la kvanto de landaj sekcioj kiuj taksas tion bona (5 en 2011 kaj 4 en 2010). Bedaŭrinde neniu asocio konsideras tiun agadkampon bonega en 2011, samkiel en 2010.

Ĝenerale ni povas konstati, ke la akirado de novaj aktivuloj ŝajnas esti malfacilaĵo en ĉiuj asocioj.

Diagramo 7



Diagramo 8 sciigas al ni kiel la asocioj taksis sian informadon en la jaroj 2010 kaj 2011. Samkiel en 2010, ankaŭ en 2011 la plimulto de la landaj sekcioj opiniis sian informadon bona (12 en 2011 kaj 13 en 2010). Iom malpli da asocioj taksas tiun agadkampon nek bona, nek malbona en 2011 (5 en 2011 kaj 7 en 2010), dum kreskis la kvanto de la organizoj, kiuj konsideris ĝin malbona (4 en 2011 kaj 2 en 2010) aŭ malbonega (3 en 2011 kaj 2 en 2010). Nek en 2010, nek en 2011 estis ajna asocio, kiu taksis sian informadon bonega.

Sume ni povas konstati ke en 2011 la asocioj taksis iom malpli bona sian informadon.

Diagramo 8



Kiel ni povas vidi sur Diagramo 9, estas kelkaj ŝanĝoj rilate la taksadon de varbado. En 2011 pli da asocioj opinias tiun agadkampon malbonega (4 en 2011 kaj 2 en 2010), kaj iom malpli da ili konsideras ĝin malbona (8 en 2011 kaj 7 en 2010). Malpli da organizoj trovas la varbadon nek bona nek malbona (11 en 2011 kaj 8 en 2010), sed pli da asocioj konsideras ĝin bona (5 en 2011 kaj 3 en 2010). Kaj en 2011 kaj en 2010 ne estis unu sola asocio kiu opiniis sian varbadon bonega. Ĝenerale, la asocioj ne estas kontentaj pri sia varbado.

Diagramo 9



Diagramo 10 montras kun kiu(j) Esperanto-asocio(j) havas rilatojn la landaj sekcioj. Videblas, ke la plej multaj el ili (18) estas konektitaj al nejunularaj organizoj. Krome, preskaŭ la duono de la organizoj (10) estas en kontakto kun lokaj grupoj kaj 9 de ili kun aliaj LS-oj. Unu asocio menciis sian kunlaboron kun E@I, kaj 3 asocioj respondis, ke ili ne havas ajnan kontakton kun aliaj Esperanto-organizoj.

Estas ĝojige, ke tiom multe da organizoj havas kontakton kun nejunularaj Esperanto-organizoj, tamen estus tre grave, ke ili havu rilatojn ankaŭ kun aliaj junularaj organizoj.

Diagramo 10



Indas kompari la taksadon de la rilatoj kun la nejunulara organizo de la respondintaj 24 asocioj. Diagramo 11 montras iliajn taksadojn en 2010 kaj en 2011. Samkiel en 2010, ankaŭ en 2011 estis 2 asocioj, kiuj taksis la rilatojn malbonega, dum malpliiĝis la nombro de asocioj en 2011, kiuj konsideris tion malbona (1 en 2011 kaj 4 en 2010). En 2011 estis 9 organizoj, kiuj opiniis tiun sian agadon nek bona nek malbona. En 2010 la saman opinion havis nur 3 organizoj. Kaj en 2010 kaj en 2011 proksimume la duono de la 24 asocioj (13 en 2011 kaj 12 en 2010) raportis pri bona rilato kun la nejunulara organizo. En 2011 estis nur 1 asocio, kiu taksis tiun agadkampon bonega, dum en 2010 estis 3.

Estis nur unu asocio, kiu aparte raportis pri tre streĉa rilato kaj 2 organizoj respondis, ke ili ne kunlaboras kun la “gepatra organizo“. 4 asocioj menciis, ke la nejunulara organizo havas membrojn de la junulara organizo en sia estraro. Krome 2 organizoj emfazis, ke la nejunularaj asocioj helpas ilin ĉefe kun la burokratajoj.

Diagramo 11



Kiel ni povas vidi en Diagramo 13, iom malpli ol la duono de la landaj sekcioj (47%) havas kontakton kun neesperantaj organizoj. Inter tiuj organizoj estis menciitaj junulara centro (JEBUO), radioamatora kaj naturprotekta organizoj (JSK), Akademia Centro de Studentaj Aktivaĵoj (ĈEJ), skoltoj (HEJ), turista klubo kaj Ukrainia Junulara Forumo (ULEJ), Komunumo de Cervia, AEGEE Torino, ESN (IEJ), Pola Konsilio de Junularaj Organizoj (PEJ).

Diagramo 13

Diagramo 14 montras kiel taksis siajn eksterajn rilatojn la respondintaj asocioj en 2010 kaj en 2011. Preskaŭ ne menciinda ŝanĝoj inter la respondoj de la du jaroj. Samkiel en 2010, ankaŭ en 2011 la plejmulto de la asocioj trovis tiun agadkampon bona (7 ascioj en ambaŭ jaroj) aŭ nek bona nek malbona (8 en 2011 kaj 7 en 2010). Iom malpli da landaj sekcioj konsideris siajn eksterajn rilatojn malbonaj (5 en 2011 kaj 6 en 2010) kaj la sama kvanto de organizoj opiniis la rilatojn malbonegaj (4).

Diagramo 14



Rilate la malfortaĵojn de la asocioj venis tre diversaj respondoj. 7 asocioj menciis la mankon de aktivuloj, 5 plendis pri la malfacileco akiri novajn membrojn, kaj 3 organizoj sciigis pri financaj problemoj. Po unu landaj sekcioj informis pri manko de oficiala statuso, eksteraj rilatoj, taŭga ejo, efika informado, kunlaboro kun la nejunulara organizo, kunlaboro kun aliaj LS-oj, regiona agado kaj unu organizo sciigis pri personaj konfliktoj en la estraro. 9

asocioj ne respondis tiun ĉi demandon.

Inter la fortaĵoj de la landaj sekcioj, la plej ofte menciitaj estis la agademo kaj entuziasmo de la aktivuloj, entute 10 asocioj menciis tion. Plie 2 organizoj konsideris sia fortaĵo la kunlaboron kun nejunulaj esperantistoj. Po unu asocio informis pri kontentiga financa situacio, efika informado, bonaj renkontiĝoj kaj harmonia kunlaboro en la estraro. 9 asocioj ne respondis la demandon.

5. Estraro

En la sekva parto estas informoj pri la estraroj de la landaj sekcioj.

La estraroj konsistas el diversnombraj personoj, de 1 ĝis 10. Plej kutime 5 personoj estras la landajn sekciojn. Unu asocio indikis unu estron anstataŭ estraro, 2 asocioj havas 2-personan, 4 asocioj havas 3-personan kaj 2 asocioj havas 4 personan estraron. En 5 organizoj estas 5 personoj, en 1 organizo 6 personoj kaj en 2 organizoj 7 personoj en la estrarano. 1 estraro havas 8 anojn, 3 estraranoj havas 9 kaj 1 estraro havas 10 anojn. 2 asocioj ŝajnas ne havi estraron.

La estrar-periodo estas malpli longa ol 1 jaro en unu asocio, 1 jaron longa en 9 organizoj, 2 jarojn longa en 11 landaj sekcioj kaj 3 jarojn longa en 2 asocioj. 1 organizo ne respondis la demandon. La nova estraro elektiĝas en januaro en 3 organizoj, en februaro en 1 organizo, en marto en 1 organizo, en aprilo en 2 organizoj, en majo en 4 organizoj, en junio en 2 organizoj, en julio, septembro kaj novembro, en po 1 organizo, kaj en decembro en 3 organizoj.

Respondante al la demando pri estraraj kunvenoj 6 organizoj raportis, ke ili fizike kunvenas pli ol du-foje jare, dum 5 asocioj informis ke ili kunvenas du-foje. Estis 4 organizoj kies estraranoj havas fizikan kunsidon unu-foje jare, dum 9 landaj sekcioj konfesis, ke ili ne kunvenas ĉiujare. Bedaŭrinde, ne scieblas ĉu tiuj asocioj kunvenas fizike entute aŭ ne. Diagramo 14 montras la oftecon de la fizikaj kunvenoj.

Diagramo 14



Aldone al la fizikaj estrarkunvenoj, indas scii ankaŭ, kiom ofte la asocioj kunsidas rete, kio ja estas la pli rapida kaj komforta maniero kunsidi, eĉ se ne la pli efika. Kiel Diagramo 15 montras, tri asocioj raportis pri ĉiumonata retkunsido, unu kroma organizo informas nin pri dumonataj virtualaj kunvenoj. Pli ol duono de la asocioj (14) neregule kunvenadas rete kaj 6 asocioj sciigas al ni ke ili ĝis nun neniam kunvenis en tiu formo.

Diagramo 15



Estas interese rigardi la oftecon de la retkunsidoj de tiuj 9 organizoj, kiuj skribis, ke ili ne kunvenas ĉiujare. Bedaŭrinde, ŝajnas ke ili ne nur fizike ne kunsidas, sed ankaŭ la retaj kunvenoj tre maloftas. 4 de la asocioj, kiuj ne kunvenas fizike ĉiujare, retkunsidas neregule, kaj la aliaj 5 organizoj ankoraŭ neniam organizis virtualan kunvenon.

Por enestrara komunikado, pli ol duono de la landaj sekcioj (13) uzas diskutliston, kiel tion vi povas vidi sur Diagramo 16.

Diagramo 16



6. Informiloj

La jena parto pritraktas la informilojn uzatajn de la landaj sekcioj.

Diagramo 17 informas nin pri la uzataj informkanaloj, el kiuj la plej granda parto estas interreta. Ne estas surprizige, ke la plej populara informkanaloj estas Facebook, 17 de la asocioj uzas ĝin por diskonigi informojn pri sia agado. La dua plej vaste uzata kanalo estas retpoŝta diskutlisto (14) kaj tion sekvas reta dissendo (12). Pliaj uzataj informkanaloj estas rubriko en aparta revuo (8), propra elektronika eldonaĵo (6), Twitter (4), propra papera eldonaĵo (3), RSS (2), Vkontakte (1), Ipernity (1) kaj forumo (1). 3 asocioj (LEJL, REJM, JES) skribis ke ili ne uzas ajnan informkanalojn.

Diagramo 17



8 el la asocioj indikis ke ili havas propran organon. 4 de tiuj estas retaj (tiuj de NEJ, GEJ, BEJ kaj JEJ), 1 estas rubriko en reta, nejunulara organo (ĈEJ) 2 estas paperaj (JSK kaj PEJ), 1 estas rubriko en nejunulara revuo (ULEJ) kaj 1 asocio zorgas pri la eldonado de revuo, kvankam ĝi ne estas junulara (SKEJ).

Krom 3 landaj sekcioj (JSK, LEJL, JES) ĉiu havas propran retejon. Aldonindas ke JSK verŝajne ne havas retejon pro la mallibereco kaj malfacileco de la uzado de interreto en Kubo. Tion ŝajnigas ankaŭ la fakto, ke ili havas paperan eldonaĵon. La retejoj de 6 asocioj havas nur stabilan enhavon, 1 hejmpaĝo havas nur aktualaĵojn kaj 11 havas kaj stabilan enhavon kaj aktualaĵojn. 3 asocioj ne respondis al tiu demando.

Rilate la refreŝigon de la retejoj, 1 asocio raportis ke oni refreŝigas ĝin minimume unufoje semajne, la hejmpaĝo de 1 organizo estas refreŝigata minimume unufoje en ĉiu dua semajno, kaj 4 asocioj prizorgas sian retejon minimume unufoje monate. La aliaj asocioj refreŝigas sian retejon malpli ofte, 3 de ili unufoje en tri monatoj, 1 asocio unufoje jare kaj 2 asocioj malpli ofte ol unu jaro aŭ neniam. Pliaj 6 organizoj zorgas pri sia retejo neregule kaj 3 asocioj ne respondis la demandon.

7. Renkontiĝoj

Renkontiĝoj estas tre gravaj por la landaj sekcioj, pere de ili eblas kunlaborigi la junulojn, akiri novajn membrojn, kontaktiĝi kaj eventuale kunlabori kun aliaj LS-oj.

Diagramo 18 montras la renkontiĝojn, kiujn la LS-oj mem organizis aŭ kunorganizis kun aliaj organizoj. Kiel vi povas vidi, la plej kutimaj estas la pli mallongaj (maksimume 4-tagaj) eventoj, en 2011 12 organizoj raportis pri la organizado de tiaj renkontiĝoj kaj 9 landaj sekcioj skribis, ke ili kunorganizis tiuspecan renkontiĝon. Plie, 10 organizoj organizis pli longajn (almenaŭ 4-tagajn) eventojn kaj 4 asocioj partoprenis en la organizado de tiaj aranĝoj. 7 asocioj organizis kaj 6 asocioj kunorganizis seminarion, trejnadon aŭ kurson, dum nur 1 asocio organizis kaj 3 organizoj kunorganizis lingvokulturan festivalon.

Rilate al neesperantaj aranĝoj, 2 asocioj mem organizis kaj 3 organizoj partoprenis en la organizado de tiaj eventoj. Bedaŭrinde, tiu demando ne estis bone vortumita, ja en la respondebloj estis diversaj aranĝotipoj laŭ longeco kaj laŭ funkcio, kaj unu konkreta evento

povus aparteni al pluraj tipoj de la menciitaj kategorioj (ekzemple io povus esti 5-taga neesperanta lingvokultura festivalo). Menciindas ankaŭ, ke 4 asocioj ne organizas ajnan eventon kaj 9 organizoj ne partoprenas en la organizado de eventoj de aliaj organizoj.

Diagramo 18



Tabelo 1 montras la organizitajn eventojn de la LS-oj.

Tabelo 1

BEJ	Novjara Aranĝo
ĈEJ	
GEJ	
HEJ	IJS, JER
HEJS	
IEJ	IJF
JEA	Kunikla renkontiĝo, aŭtuna renkontiĝo, karavano al JES, partopreno en diversaj eventoj
JEBUO	Zamenhofa festo, seminario en Rumonge
JEJ	Komuna Seminario
JELI	
JES	
JSK	Havana Festivalo, diversaj malgrandaj aranĝoj
KEJ	Internaciisma renkontiĝo (3-taga)
KEJA	MIRO
LEJL	
MEJ	
NEJ	du unutagaj ekskursoj
NJE	kabana semajnfino kun FEJO
PEJ	2 semajnfinaj kunvenoj, JES, ARKONES
REJM	
SKEJ	Somera Esperanto-Studado, Zamenhof-vespero en Bratislavo, Tutslovakia Renkontiĝo (kun E@I)
ULEJ	Kursoj por komencantoj, lingvofestivalo, Humurino, festivalo "Tripilske kolo" , IJK, koncerto de Jomo
USEJ	partopreno en diversaj aranĝoj
VEJO	

8. Konkludo

Ĉi-jare la enketon partoprenis 24 landaj sekcioj de TEJO, signife malpli ol pasint-jare. Estas kontentige ke la pli multo de la respondintaj asocioj taksas sin aktivaj. Rilate la financan situacion de la organizoj, triono de ili skribas ke ili ne havas propran financon, dum la aliaj ĉefe raportas pri kontentiga financa situacio, nur 2 asocioj plendas pri seriozaj problemoj. Evidentiĝis ankaŭ tio, ke la asocioj havas diversajn kutimojn kiel aŭ ĉu entute pagigi siajn membrojn, en kelkaj organizoj tute ne estas membrokotizo, dum en aliaj asocioj pagas nur kelkaj membroj, kaj estas ankaŭ landaj sekcioj, kie ĉiu pagas.

Laŭ la respondoj, multaj asocioj kutimas varbi novajn membrojn en universitatoj/lernejoj, pere de amaskomunikiloj aŭ dum aranĝoj. Averaĝe, la organizoj konsideris siajn informadan agadon, rilatojn kun la nejunulara organizo kaj eksterajn rilatojn bonaj, la engaĝigon de la nunaj aktivuloj oni taksis mezbona, dum la akirado de novaj aktivuloj ŝajnas aperi kiel malfacilaĵo. Laŭ la enketo, la plej multo de la asocioj havas kontakton kun la nejunulara landa sekcio, kaj multaj estas en kontakto ankaŭ kun lokaj grupoj aŭ aliaj landaj sekcioj.

Pri la estraroj de la asocioj eblas diri ke ili konsistas el diversnombraj anoj (de 1 ĝis 10) kaj la tempo de estraraneco varias inter 1 kaj 3 jaroj. La pli multo de la estraroj kunvenas fizike almenaŭ unufoje jare, dum retaj kunsidoj montriĝas sufiĉe neregulaj, sed pli ol duono de la asocioj uzas retan diskutliston. La plej populara informkanalo estas Facebook, ĝin sekvas retaj diskutlisto kaj dissendoj. 8 landaj sekcioj havas sian propran organon, el kiuj 4 estas retaj kaj krom 3 asocioj ĉiuj havas propran retejon. Pri la renkontiĝoj direndas ke la asocioj preferas organizi pli mallongajn (maksimume 4 tagajn) eventojn, sed abundas ankaŭ pli longaj renkontiĝoj.